# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d' Orves 54490 PIENNES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

==== N° 178 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1993 ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

## LE MOT DU PRESIDENT

L' année 1993 aura été riche d' événements importants pour notre association.

Fin avril, notre pèlerinage à Lourdes fut un succès. Grâce à la présence de plusieurs étrangers, nous avons formé un groupe international soudé par la pratique de la Langue Internationale. Notre visite à la Cité St-Pierre a été pleine d' enseignements et chacun a été intéressé par cette réalisation si proche de nos idéaux. La participation à la procession aux flambeaux et à celle des malades et surtout la messe célébrée à la grotte, le dimanche matin, laisseront en nos coeurs un souvenir durable, tout comme l' hommage rendu à l' abbé Emile Peltier, notre fondateur, autour de sa tombe au cimetière de Lourdes.

En juillet, la rencontre des espérantistes chrétiens a réuni à Viviers des catholiques et des protestants venus de l' Europe entière. Dans une atmosphère fraternelle et tolérante, nous avons pu passer avec nos frères issus de la Réforme, une semaine d' amitié et d' estime réciprosues.

Ces temps forts, que chacun garde en mémoire, justifient notre action et stimulent nos efforts pour mettre l' Esperanto au service de notre Foi.

A.B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

La jaro 1993 estis riĉa je eventoj gravaj por nia asocio.

Fine de aprilo, nia pilgrimo al Lourdes estis sukcesa. Dank' al la ĉeesto de pluraj alilandanoj, ni formis internacian grupon kunigitan por la praktiko de Esperanto. Nia vizito al la Hejmo S-ta Petro grande instruis nin kaj ĉiun interesis tiu institucio tiel proksima al niaj idealoj. La partopreno en la torĉprocesio kaj en tiu de la malsanuloj, kaj ĉefe la diservo en la groto, dimanĉon

../...

matene, lasos en niaj koroj daŭran memoron, same kiel la •maĝo donita al P-ro Emile Peltier, nia fondinto, ĉirkaŭ lia tombo en la malnova tombejo en Lourdes.

En julio, la renkonto de la kristanaj esperantistoj kunigis en Viviers katolikojn kaj protestantojn venintajn el la tuta Eŭropo. En frateca kaj tolerema etoso, ni pasigis kun niaj fratoj el la Reformo, semajnon plenan je amikeco kaj reciproka estimo.

Tiuj gravaj tempoj, kiujn ĉiu memortenas, pravigas nian agadon kaj spronas nian strebadon al utiligo de Esperanto en la servo de nia Kredo.

A.B.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

VIVOFONTO

Senombra Lumo
Vi ĉirkaŭas min kaj kovras min en mia mizero;
Vi prilumas min per la radioj de via senfina grandeco;
Vi fulmrapide relevigas la mortintojn...

Vi estis proklamita Difilo,
Vi ĉion kreis, vi regras super ĉio,
Per vi ĉio ekzistas.
Al vi gloro en la nomo de ĉiuj,
En la jarcentoj de jarcentoj.

Gregorio de Narek
(Armenio, X-a jarcento)

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

PRI KLEMENTO MYIONNET (fino)

Ĉe fino de lernejstudado, Klemento eniras en Angers komercan firmaon pri ferajoj, estratan de liaj fratoj, kaj situantan en malriĉa kvartalo. Tie, en 1839, li fondas kun F. Hubert la "Conférence de St-Vincent de Paul". De tiam, lia vivo tute ŝanĝiĝis. Li decidis labori kun la fratoj nur duontage por doni pli da tempo en junulhejmo, azilo por malfavorigataj infanoj. Li ja konstatis, ke por akiri veran sukceson en tia kreado de paroĥa pastro, nepre necesus partopreno de sindonaj laikuloj. Pasie, li prezentas al la tiama Angers-a episkopo projekton pri realigado de komunumo en kiu oni kunligus religian vivon, laŭ ritoj de malnovaj ordenoj, al popola apostolado, projekto aprobata. Sekve, el interrenkontiĝo de Klemento kun J.L. Le Prévost, pioniro pri socia katolikismo kaj amiko de Ozanam, konkretiĝas la jena ideo: dispartigi servojn al mizeruloj inter religiuloj, aliparte submetitaj al nepraj devoj de religia vivo, kaj sindonaj laikuloj. Farite, sukcesplene.

En 1845, Klemento foriras el Anĵuo por iĝi en Paris la unua frato en la komunumo "S-ta Vincento de Paŭlo" fondita en tre malriĉa kvartalo de la franca ĉefurbo.

Dum pli ol kvardek jaroj, li dediĉis sian vivon al servoj por mizeruloj, ĉifonistoj, senlaboruloj, vagantaj junuloj. En tiu epoko, malfacile estis eniri la parizajn "titi", 12- ĝis 16-jarajn, malbone, malpure vestitajn, volonte bruemajn, en preĝejojn, kie ili timigis la paroĥanojn. La diplomateco de Le Prévost, la firmeco de Klemento Myionnet fronte al la ribeluloj pacigis la du kampojn kaj la junuloj, impresitaj de la personeco de Klemento elmontris pli grandan emon al metilernado kapabla direkti ilin al pli konvena socia vivo.

Konservante fortan familian spiriton, K. Myionnet, en orfejo de Vaugirard en Paris, gvidis du cent junulojn, uzante samtempe firmecon kaj amon, kiuj enkondukis fortan simpation de ĉiuj, kiuj nomis lin "la bona patro Myionnet".

Iom post iom, malsano alportas fizikajn malbonaĵojn, i.a. blindiĝon, sed la sindona frato daŭre helpas laŭpove al mizeruloj.

Dum la vintro 1886, li devas eniri flegejon, kie li mortos 74-jara.

Kompilis S-ino CHEVERRY

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1993: 4) S-ino KLEIN (Calvados) Koran bonvenon!

Membroj bonfarantoj 1993: 7) F-ino MARTIN (A-M) Dankegon pro la grava helpo!

## AL MARIA

Ni konfidas al vi,
ho Patrino de la Eklezio,
ĉiujn problemojn de tiu Eklezio,
ĝian tutan mision, ĝian tutan servon.
Permesu al ni
iri renkonte al ĉiuj homoj
kaj ĉiuj popoloj,
kiuj serĉas Dion.
Helpu nin anonci Kriston.

kaj atesti
la forton kaj la dian saĝon,
kiujn kaŝe entenas lia Kruco.
Patrino de la bona konsilo
montru al ni kiel
ni devas servi la homon:
kiel direkti lin
sur la vojo al la savo.

Johano Paùlo II-a

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## VIVO DE JOHANA JUGAN (daùrigo)

En 1843, P-ro Le Pailleur elektis kiel superulinon la 23-jaran Marian Jamet (Jame), kaj la komunumo alprenis la nomon "Fratinoj de la malriĉuloj".

En 1846, Johana foriris al Rennes, kie ŝi intencis monkolekti por la malriĉuloj de St-Servan, sed ŝi vidis almozulojn kaj tuj projektis fondaĵon. Maria venis al Johana, kiu jam estis luinta loĝejon, en kiu oni akceptis dek gastojn. Post du monatoj, necesis transloĝiĝi en pli grandan domon. Tria domo estis starigita en Dinan en malnova turo. Angla turisto vizitis tiun malgajan lokon, kiun prilumis la ĝojaj vizaĝoj de la gastoj.

Post du jaroj, "l' Univers", pariza gazeto, publikigis artikolon de Louis Veuillot, katolika ĵurnalisto, kiu laùde priskribis lian viziton al la fratinoj. Tiu artikolo vaste konigis la verkon de la "Etaj fratinoj de la malriĉuloj".

Decembro 1849: Johana alvenas en Angers. Helpe de pastro el Rennes, ŝi rapide trovas domon.

Aprilo 1850: nova fondaĵo estas starigita. La episkopo, M-ro Angebault, kore akceptas la fratinojn, kiuj komencas monkolekti kaj povas akcepti la unuajn maljunulojn.

Vintro 1850-51: Johana monkolektas en Dinan, Lorient kaj Brest.

Post Angers, ŝi kreas komunumojn en Bordeaux, Rouen kaj Nancy.

1852: okaze de vizito al pariza ~~ai~~ azilo, ĵus fondita de la fratinoj, Ch. Dickens raportas pri ĝi en sia semajna gazeto "Household Words". Tio faciligis la kreadon de domo apud Londono.

Pastroj Massot kaj Le Pailleur proponas novan regularon, pli ampleksan kaj precizan, al la Rennes-a episkopo, kiu aprobas. La "familio" iĝas vera religia kongregacio. La ĉefdomo transloĝiĝas al Rennes.

1853: oni nombras jam 500 fratinojn.

1854: Papo Pio XI-a aprobas la kongregacion, kiun plene estras P-ro Le Pailleur. Liaj egaj aùtoritataj postuloj mirigis la altajn instancojn, kiuj enketis.

1890: oni eksigas P-ron Le Pailleur kaj sendas lin en Rouen, kie li finis sian vivon.

1856: la ĉefdomo transloĝiĝis al St-Pern, en la turon S-ta Jozefo, kie ĝi restas ĝis nun.

(daùrigota)

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## PREĜO - LUMO NEVIDEBLA GEMONAĤEJO

Tiu nevidebla gemonaĥejo estas komunumo de homoj ligitaj per simpla regularo: ĉiu membro sin devigas doni preĝotempon ĉiutage al Dio kaj al la Eklezio je la nomo de la mondo kaj por la mondo. Li/ŝi estas helpata per mallonga skemo ricevita ĉiun duan semajnon.

La preĝo de ĉiu, atestanto de la amo de Kristo al la mondo, iĝos kiel lumo, kiu kontribuos al dispelo de la mallumo.

En 1986, Kardinalo Coffy, ĉefepiskopo de Marseille, donis la nomon "Nevidebla gemonaĥejo" al tiu aro da preĝantoj.

En nia tempo, kiam la homaro estas en nestabila situacio, vere necesas la preĝo.

Vi povas peti pliajn informojn de: Prière-lumière Centre "Le Mistral"
11, impasse Flammarion 13001 MARSEILLE

Roger DESPINEY

## ABATEJO NIA SINJORINO DE AIGUEBELLE

La abatejo, je 18 km de Montélimar, estis fondita la 26-an de junio 1137 honore al la Virgulino Maria, sur bieno donacita de Gontard LOUP, Senjoro de Rochefort-en-Valdaine, al la monaĥoj de la abatejo de Morimond en Champagne. La nova monaĥejo baldaŭ ricevis gravajn donacojn en Dauphiné (Dofine), en la regiono de Orange kaj en Vivarais (Vivare). Fine de la XIII-a jc., la abatejo disradiis super Provence, Dauphiné kaj Auvergne (Overnj). Poste venis la dekadenco, pro militoj, epidemioj kaj malaltiĝo de la nombro da alvokiĝoj. Kiam la abatejo estis forigita de la Revolucio, en 1791, restis nur tri monaĥoj.

Nova impeto ekis ekde 1815 kaj daŭras ĝis nun. Dank' al Aiguebelle nun ekzistas ses monaĥejoj: Nia Sinjorino de la Neĝoj, diocezo de Viviers, ekde 1850; S-ta Maria de la Dezerto, diocezo de Toulouse (Tuluz) ekde 1852; Nia Sinjorino de Dombes, diocezo de Belley (Bele) ekde 1853; Nia Sinjorino de Acey (Ase), diocezo de St-Claude (Klod) ekde 1875; Nia Sinjorino de la Atlaso, diocezo de Alger(Alĵe) ekde 1934; Nia Sinjorino de Koutaba (Kutaba), dioceso de Bafoussam (Kameruno) ekde 1951.

La regulo de tiuj monaĥoj estas tiu de S-ta Benedikto (mortinta en 547) laŭ la observado de Citeaux (Sito) kaj la reformo de ~~la~~ Abato DE RANCE. La monaĥoj de Aiguebelle (Egebel) estas nomataj Cistercianoj-Trapistoj. La specifecoj de ilia vivmaniero estas silento, mondizoleco, noktleviĝo, diservkantado, manlaboro, legado kaj studado, sobreco en nutrado kaj speciala devoteco al la S-ta Virgulino.

La abateja preĝejo estas Minora Baziliko depost 1937; ĝi formas latinan krucon, havas murojn tre dikajn, masivajn pilierojn kaj duoncirklajn arkojn; ĝi estas 50 metrojn longa, 17 metrojn larĝa kaj 10 metrojn alta; la navo estas 9 metrojn larĝa.

LA HOTELO - Ĝi staras sur altebenaĵo, kiu superstaras la monaĥejon kaj la valon. Tiu vasta konstruaĵo havas 40 metrojn longan fasadon; ĝi enhavas manĝejon, prelegĉambrojn, salonojn por vizitantoj, bibliotekon, kuirejon kaj ĉirkaŭ kvardek ĉambrojn kaj dormejojn sur du etaĝoj. La hotelo estas principe rezervita al homoj, kiuj porpreĝe izoliĝas kaj al parencoj de religiuloj; ili havas je dispono ĝardenojn kaj boskojn.

S-ta Benedikto, leĝofaranto de la okcidentaj monaĥoj, deziras, ke ĉi tiuj sin vivtenu mem laŭeble, t.e. ke en la monaĥejo oni trovu akvon, legomĝardenon, ke oni starigu muelejon, bakejon, metiejon por la praktikado de diversaj metioj, tiel ke la monaĥoj kiel eble malplej eliru el sia soleco. Pro tio la diversaj oficoj, kiuj faras el la monaĥejo miniaturan civiton. Krom la lignaĵejo, panbakejo, veturilriparejo, fruktejoj, legomĝardeno, abelejo, fojnejoj, kokejo kaj brededo de brutaro, estas granda distilejo, kie oni fabrikas likvorojn kaj siropojn, kun ĉambroj de distilado, preparado kaj ekspedo, keloj kaj staploj; tiu distilejo situas sude de la hotelo.

Marcel COLLEU

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## NIA VENONTA KONGRESEJO

En majo 1994 ni kongresos en Moulins-lès-Metz en malnova kastelo, kies ĉirkaŭfosaĵojn akvumas la rivereto Montvaux.

Ekde 1711, la kastelo, kies nomo estis antaŭe Grognat, nomiĝis Grignant. Kiam okazis la Franca Ravolucio, la posedantoj fuĝis eksterlanden kaj la kastelo estis vendita. La sekvantaj posedantoj plurfoje ŝanĝiĝis. Fine ĝi iĝis posedaĵo de la germana urbestro en Metz en 1901.

Depost 1923, ĝi apartenas al la episkopejo en Metz kaj oni uzas ĝin kiel kunvenejon por la katolikaj grupoj. Lia nuna nomo estas Ermitage St-Jean.

Facile atingebla pere de la aŭtobuso nº 31, kiu foriras antaŭ la stacidomo en Metz, ĝi situas apud la paroĥa preĝejo en Moulins-lès-Metz, tute proksime al la bela urbo Metz, kiun ni vizitos okaze de la kongreso.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## IKUE-membroj 1993

17. S-ro COLARUOTOLO; 18. S-ro BESSIERE; 19. S-ro GOURDON; 20. F-ino CHATELUS; 21. P-ro HEROUX.

P-ro Degrelle atentigas, ke la IKUE-kotizo estas 150 F, kiel indikite en la kotiztabelo, sur la lasta paĝo de F.K.E.

## LOURDES (Lurd)

Kio do okazis en tiu urbeto ĉe la piedo de Pireneoj? Kial de pli ol cent tridek jaroj, homamaso el la tuta mondo tien pilgrimas?

Ĉar iun tagon la S-ta Virgulino aperis al dek-kvarjara junulino, Bernadette SOUBIROUS (Bernadet Subirus). Ĉar Maria, Patrino de Dio kaj de ĉiuj homoj, venis tien por memorigi la sekreton de la feliĉo: malriĉeco, preĝo, pentofaro, Eklezio.

La 11-an de februaro 1858, Bernadette Foriras el la "celo" (karcero), rifuĝejo de sia mizerigita familio, por serĉi lignon kun amikinoj. Ĉe la nigra-roka kavo de Massabielle (Masabjel), Bernadette aŭdas "bruon kiel ventoblovon", kaj ŝi vidas lumon, kiu baldaŭ prilumas la figuron de junulino, "tiel juna kaj tiel eta" kiel ŝi: 1,40 m en la dek-kvara vivjaro! Ŝi ridetas al ŝi kaj invitas ŝin preĝi.

La 18-an de februaro, okazas promesa interŝanĝo:"Ĉu vi bonvolas fari al mi la favoron veni ĉi tien dum dek kvin tagoj?" Bernadette jesas. "Mi ne promesas feliĉigi vin en ĉi tiu mondo, sed en la alia". La alia mondo estas tiu de la Amo, kiun Bernadette tuj spertos jam sur ĉi tiu tero, tra la suferado mem.

Meze de la tag-dekkvino, la vojo al tiu mondo estas sciigita, ĝi estas la konvertiĝo, la ŝanĝiĝo de la koro. "Pentofaro! Preĝu Dion por la konvertiĝo de la pekuloj. Ĉu vi konsentas suprengrimpi sur la genuoj kaj kisi la teron por la konvertiĝo de la pekuloj? Pentofaro! Pentofaro! Pentofaro! Iru trinki al la fonto kaj tie vin lavi. Vi manĝos de tiu herbo, kiu estas tie".

La fonto ŝprucanta el la koto... Ĉiu, se li prenas tempon kaj ricevas la kuraĝon skrapi la karapacon de sia egoismo kaj de siaj pekoj, kiuj igas lin iri kvarpiede kaj manĝi herbon kiel la bestoj, ĉiu povas aŭdi el la fundo de sia koro fonti vivigan akvon, ŝprucantan el la koro de Jesuo, el la koro de Dio mem.

La 2-an de marto, lasta peto:"Iru kaj diru al la pastraro, ke oni venu ĉi tien procesiante kaj ke oni konstruu kapelon". La kapelo estas la Eklezio el vivantaj ŝtonoj, kiu trinkeĝas el la vivakva fonto kaj, en la Eŭkaristio, sin nutras el sia Sinjoro.

Ĉe la 16-a apero, la 25-an de marto, festo de la Koncipiĝo de Jesuo en la sino de Maria, la junulino diras sian nomon:"Mi estas la Senpeka Koncipado". Maria, senmakula, lasas pasi en si la lumon kaj la vivon de Dio por ĝin doni al la mondo.

Bernadette ankoraŭ vidos Marian post la paska festo, la merkredon 7-an de aprilo; kaj la 16-an de julio, ŝi iras trans la rivero Gave (Gav) kaj, malgraŭ la distanco, ŝi diros:"Mi ŝin vidis kvazaŭ mi estis tie".

Kiel hieraŭ al Bernadette, hodiaŭ Maria diras al ni:"Ĉu vi bonvolas fari al mi la favoron veni ĉi tien?"

Eltirita el la gvidlibro por vizitanto kaj
pilgrimanto. Trad. M. COLLEU

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## NIA KONGRESO 1994

DATO: de vendredo 13-a de majo posttagmeze ĝis mardo 17-a de majo post la tag-manĝo.

LOKO: ERMITAGE SAINT-JEAN 7, rue des Moulins 57160 MOULINS-lès-Metz

Tel. 87 60 02 78

Pliaj praktikaj informoj aperos en la decembra numero de F.K.E., sed jam nun, nepre rezervu tiujn datojn kaj invitu konatojn kaj korespondantojn.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## RESANIGU MIN...

Kaj se mia koro estus resaniĝinta:
miaj okuloj pli bone vidus vin,
miaj oreloj pli bone aŭdus vin,
en la ridoj kaj en la ploroj;
miaj manoj donus,
mia lango malligiĝus,
por pli bone vin anonci.
Resanigu mian koron, Sinjoro,
kiam vi volos,
se eble antaŭ mia morto,
por ke mi estu preta vin renkonti.

R. DALOD

KELKAJ INFORMOJ

1. Laŭ decido de aŭgusto 1992, Pioneer Scouts of India enkondukis Esperanton, kiel devigan instruan temon por tutlanda skolta programo. Jam eklernis la lingvon 75 instruistoj kaj estraranoj en la tuta lando. Ŝatus ricevi instru-materialon: S-ro A. Halder, Jamboni, P.O. BOLPUR 731204 HINDA UNIO.
2. En la kastelo de Taillé, apud Tours, la 2-an kaj 3-an de oktobro, kursoj diversnivelaj. Inf: Centre Culturel Esperanto 6, av. du Général de Gaulle 37000 TOURS.
3. Trinivelaj kursoj en Mittelwihr, 16-an kaj 17-an de oktobro. Inf: Ed. Ludwig 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR.

El "Kulturaj Kajeroj" n° 2-1993

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1993

| | |
|---|---|
| I.K.U.E. kun "Espero Katolika" | 150 F |
| Peranto: P-ro R. DEGRELLE p.ĉ.k. NANCY 2 555 38 L. | |

----------

| | | |
|---|---|---|
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - | unuopulo | 40 F |
| | geedza paro | 50 F |
| infano ĝis 16-jara, pastro, | religiul(in)o | 20 F |
| | bonfaranto | 200 F |

----------

| | |
|---|---|
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" | 260 F |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj jarlibro | 275 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO

1. Le mot du président
2. Vivofonto
Pri K. Myionnet
3. Al Maria
Vivo de J. Jugan
Preĝo-Lumo
4. Nia Sinjorino de Aiguebelle
Nia venonta kongreso
5. Lourdes
Nia kongreso 1994
Resanigu min...
6. Kelkaj informoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 3ème trimestre 1994
C.P.P.A.P. n° 62 532.
Directeur: Albert BESSIERE
Directeur-délégué:
René-Jean MARMOU

Polycopié par l'A.C.F.E.(enregistrée le 6 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous le n° 2523 bis, J.O. 23/05/1977)
au prieuré St-Martin
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE